# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-31 sendita el Budapeŝto la 5an de aŭgusto

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

**LA TAGO de ESPERANTO 2021**

# Bonaj preparoj, atentindaj rezultoj

La 26an de julio estas la Esperanto-Tago, kiu donas al ni eblojn konigi al la mondo la ecojn kaj valorojn de nia unika lingvo. Kerne al tiu mesaĝo estas niaj argumentoj por komunika justeco. La elektita tago kompreneble omaĝas al la Unua Libro en 1887, kiu prezentis la novan lingvon al la mondo.

La dua granda "Tago" por nia komunumo estas la Zamenhofa Tago en la 14a de decembro, la naskiĝjaro de Zamenhof. Tiu tago tamen estas esence tago por esperantistoj, kiuj abunde festas ĝin en kluboj, sopcietoj kaj asocioj. Kontraste, la Esperanto-Tago estas esence direktita al la okstera publiko. La ĉi-jara sukceso ŝuldiĝas al multmonata intensaj streboj de la laborgrupo ZPI: 'Zorgantoj pri Informado'. Ili akiris la kutiman afiŝon kaj sukcesis traktigi ĝiajn negrandajn tekstojn al 32 lingvoj, kiujn vi trovu (danke al artisto Peter Oliver) ĉe:

https://i.getspace.eu/cloud/index.php/s/MPETo3GExBZNgyF?path=%2FEO-TAGO-2021-afishoj

La komunumo devas agnoski la gravecon de kontinua informado kaj zorgi, ke ĉiu lando kun esperantistoj havu aktivan partoprenanton en la ZPI-grupo. Sur la sekvaj paĝoj jen resumo el kelkaj el la landoj, kiuj festis la tagon per publike direktitaj agadoj:

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Redaktoroj: Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean



**ENHAVO**


- Nia informa tago!
- Bulgario ĝis Burundo
- Butano ĝis Vjetnamio
- Ĉeĥio ĝisSvedio
- Albanio ĝis Uzbekio

# Albanio

Ĉi jare oni festis iel originale la esperanto tagon en Prishtina, Kosovo. Ĝuste la 26 an de julio en la salono de respektata Asocio de Kosovo oni promociis la libron de Adem Demaĉi "Miaj prizonoj- mia granda ŝanco" en 34 plej parolataj lingvoj de la mondo. Estis ankaŭ esperanto, sed en mia salutparolo estis emfazita ke danke al esperantistoj oni havigis tiujn multnombrajn tradukojn. Mem la aŭtoro Adem Demaĉi, kiam li ankoraŭ vivis alte aprecis la internacian lingvon, simile al Granda Gandhi laŭ rakonto de Edmond Privat. En la solenaĵo ĉeestis ĵurnalistoj de radiotelevido ŝtata de Kosovo kaj de gazetaro

Bardhyl Selimi

# Bulgario

okaze de la E-Tago en du bulgaraj programoj oni povis aŭskulti du intervjuojn pri Esperanto. La unua estas aŭskultebla ĉe:

https://bnr.bg/sofia/post/101503917/otbelazvame-mejdunarodnia-den-na-esperanto

Ĝi daŭris duoble pli longe ol planite, ĉar la ĵurnalistino vere interesiĝis kaj starigis bonajn demandojn, kaj mi plezure respondadis. Ni parolis pri lingva justeco, pri la tricent mila artikolo de la E-Vikipedio, pri Esperanto en kondiĉoj de pandemio ktp. (Mi provos transskribi la tekston kaj laŭeble traduki al Esperanto aŭ almenaŭ resumi, ĉar temas pri ĉ. 20 minutoj, kaj mi parolas treege rapide kaj tio egalas al minimume 10 paĝoj da teksto.) Sekvis invito daŭrigi la interparolon je la 26a de septembro - la Eŭropa tago de Lingvoj.

La dua intervjuo estis kun s-ro G. Mihalkov. Ĝi okazis telefone antaŭ kelkaj tagoj kaj estis elsendita hodiaŭ, sed bedaŭrinde ĝi ne troveblas rete. Interalie temis pri E-kurso, kiu estas planata por tiu ĉi aŭtuno.

Mariana Evlogieva

# Butano

Hodiaŭ estas granda plezuro por ni ĉiuj ke unuan fojon en esperanta historio, gelernantoj el belega Butano deziras al vi Feliĉan Esperanto Tagon 2021 en ilia nacia lingvo nomata Dzonĥa. Tiu ĉi afiŝo estas disdonita al preskaŭ ĉiuj Ĵurnalistoj kaj instruistoj en tuta Butano. Dumdecembro ĉi-jare mi planas viziti Butanon. Ĉu ankaŭ vi kuraĝos kuraĝigi gejunulojn esperantistojn en tiu fora lando? Se jes bonvolu resti preta. Amike: Mian Salam SHANY, Internacia Ĵurnalisto. Retpoŝtadreso: m.s.shany@gmail.com WhatsApp: 00393511228143

# Ĉeĥio




Esperanto-tago en la ĉeĥa televido: Oni parolis pri la Tago per televido en Ĉeĥa Respubliko. La 26-an de julio la esperantisto Marek Blahuš estis intevjuita en la programo *Dobré ráno* (Bonan matenon), elsendita de la kanalo ČT2 de la TV-stacio Česká Televize. La interparolo estis dividita en tri partojn, kiuj iris en la eterontra la matena premhoro. Tiam oni ankaŭ parolis pri la artefarita lingvo Klingono. Marek Blahuš naskiĝis en Kyjov, urbo situanta en la sudorienta regiono de Ĉeĥio; krom honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Junularo, li ankaŭ apartenas al Akademio de Esperanto. Blahuš estas ano de E@I kaj profesie laboras en la Masaryk-universitato, en Brno.

# Finnlando

La E-taga afiŝo en la finna lingvo plus mia artikolo pri Zamenhof estis dissendita al la ĉefaj Finnlandaj redakcioj, , kaj almenaŭ du gravaj ĵurnaloj ĝin aperigis.

Tuomo Grundström

# Germanio




Ankaŭ en Herzberg - kiel kutime -
- ni faris reklamon, informadis pri la Tago de Esperanto,
- kontribuis al la Unesko-kampanjo por peti agnoskon de la tago,
- uzis la afiŝojn de UEA en la urbocentra Esperanto-vitrino kaj dissendis informojn per niaj kanaloj

Zsofia Korody, Peter Zilvar
Interkultura Centro Herzberg

# Hispanio

En Aragono, TV kaj radio interesiĝis pri la afero kaj informis hodiaŭ (26an de julio 2021):

Aragón TV: en teleĵurnalo "Noticias 1" kiu komenciĝas je 14a horo. La raporteto pri Esperanto aperis de la minuto 29:26 al 31:24. Ĝi estis filmata hodiaŭ mem en nia sidejo (kun interveno de Pablo Conesa kaj Lorenzo Noguero). Jen ligilo al la retejo:

http://alacarta.aragontelevision.es/informativos/aragon-noticias-1-26072021-1400

ZPI

ZORGANTOJ PRI INFORMADO

**Por la pli sistema kaj tutmonda kunordigo de niaj streboj konigi nian lingvon kaj ĝiajn valorojn al pli vasta publiko.**

# Italio

https://mail.google.com/mail/u/0/?hl=en#inbox/FMfcgzGkZZpQPWlwfVqFlsqmSWzqrbSJ au pli rekte:

Kunsenditas artikolo el la papera versio de La Nazione (28.07)
Kunsenditas artikolo el la papera versio de La Repubblica (26.07)
https://www.progetto-radici.it/2021/07/26/lesperanto-compie-134-anni-dal-1887-una-lingua-unisce-i-popoli/
https://www.aise.it/anno/lesperanto-compie-134-anni-dal-1887-una-lingua-unisce-i-popoli/163860/1
https://www.quibrescia.it/lettere/2021/07/26/cosi-giovane-e-gia-universale-la-lingua-esperanto-compie-134-anni/590829/
https://ecodellalunigiana.it/26-luglio-la-giornata-mondiale-dellesperanto/
https://www.controluce.it/notizie/dal-1887-una-lingua-unisce-i-popoli/

https://fidest.wordpress.com/2021/07/28/esperanto-dal-1887-una-lingua-unisce-i-popoli/

## Svedio




Aperis artikolo en nordsveda taggazeto. "Ŝi celebras la Esperanto-tagon lunde." Vidu la bildon.

## Vjetnamio

ankau Vjetnamio aldonis sin al la varbado:

http://vufo.org.vn/So-luoc-ve-ngay-Quoc-te-ngu-267-08-8507.html?lang=vn&fbclid=IwAR1tulO9b6UJsrhwfQBZL8WYGVDyEfL9crueFo-xfZjX3HGYwWvOHP41nxQ

Phuong Mai,

## Uzbekio

Omaĝe al la Esperanto-ago 2021 en la rubriko Surkalendara dato" de la Samarkand-regiona agĵurnalo peris artikolo de Anatolij Ionesov Ni parolas Esperanton".
En la teksto estas menciitaj la dua Virtuala Kongreso de Esperanto kaj iuj aliaj faktoj pri la lingvo kaj agado de ties adeptoj.
Akompane de kelkaj ilustraĵoj, la artikolo aperis ankaŭ en la Facebook-paĝo de la gazeto: https://www.facebook.com/sam.vestnik

La-samarkandanoj okazigas la Internaciajn Letertagojn "Assalom (Saluton), Uzbekio!", dediĉitaj al la 30-jara datreveno de sendependeco de la Respubliko Uzbekio. Ĝis la 15-a de aŭgusto 2021 ni daŭre akceptas gratulleterojn ktp okaze de tiu ĉi jubileo de nia lando. Vidu la dosieron.

# La Kongreso de ILEI (VEKI 2)

jen la informoj el la retejo de VEKI 2:

VEKI 2 – La 54-a ILEI-Kongreso (esperantujo.io)

https://ilei.esperantujo.io/veki2021/

Alkroĉe la programo de VEKI 2, ĝisdatigita ĝis la 4a de aŭgusto. Vi estos kore bonvena!

========= vortoj: 950 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.